

Emanuel Geibel,
Der Mai ist gekommen

1. Der Mai ist gekommen,
Die Bäume schlagen aus,
Da bleibe, wer Lust hat,
Mit Sorgen zu Haus!
Wie die Wolken dort wandern
Am himmlischen Zelt,
So steht auch mir der Sinn
In die weite, weite Welt.

2. Herr Vater, Frau Mutter,
Daß Gott euch behüt!
Wer weiß, wo in der Ferne
Mein Glück mir noch blüht;
Es gibt so manche Straße,
Da nimmer ich marschiert,
Es gibt so manchen Wein,
Den ich nimmer noch probiert.

3. Frisch auf drum, frisch auf drum
Im hellen Sonnenstrahl!
Wohl über die Berge,
Wohl durch das tiefe Tal!
Die Quellen erklingen,
Die Bäume rauschen all;
Mein Herz ist wie 'ne Lerche
Und stimmt ein mit Schall.

4. Und abends im Städtlein,
Da kehr ich durstig ein:
"Herr Wirt, mein Herr Wirt,
Eine Kanne blanken Wein!
Ergreife die Fiedel,
Du lustger Spielmann du,
Von meinem Schatz das Liedel,
Das sing ich dazu!"

...

Emanuel Geibel,
Migrado

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Nun Majo alvenis,
Burĝonas la arbar',
Do restu en hejmo,
Filistra homar'!
La nuboj ĉe ĉielo
Migradas jam for,
Laŭ ili nun fortiras
Min la migrama kor'.

2. Nu, patro, patrino,
Adiaŭ nun al vi,
Feliĉon ekstere
Serĉadas nun mi,
Ja, multe da vojoj
Ne vidis mi jam
Kaj multe da bonvino
Nur konas mi laŭ fam'.

3. Antaŭen, antaŭen
Dum hela sunradi',
Trans montoj, trans valoj
Kun vigla energi'!
La fontoj murmuras,
Bruigas arbojn vent',
La koro kun alaŭdo
Kunkantas pro kontent'.

4. Vespere en urbeto
Gastigos min trinkej':
"Ho, mastro, nur vinon,
Sed de bongusta plej!"
"Ekprenu gitaron,
Gajega muzikant'!"
"Prikantos mi knabinon,
De kiu mi amant'."

...

5. Und find ich keine Herberg,
 So liege ich zur Nacht
 Wohl unter blauem Himmel,
 Die Sterne halten Wacht;
 Im Winde die Linde,
 Die rauscht mich ein gemach,
 Es küsset in der Frühe
 Das Morgenrot mich wach.

6. O Wandern, o Wandern,
 Du freie Burschenlust!
 Da wehet Gottes Odem
 So frisch in die Brust;
 Da singet und jauchzet
 Das Herz zum Himmelszelt:
 Wie bist du doch so schön,
 O du weite, weite Welt!

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Emanuel Geibel, publikigita 1841.

Arg-235-464 (2010-05-01 22:42:36)

Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Emanuel_Geibel kaj la Esperantan version http://eo.wikipedia.org/wiki/Emanuel_Geibel.

5. Se mankos restejo
 Kun noktripoz' kaj vin',
 Sub ĉielo mi kuŝos,³
 La steloj gardos min,
 Bruanta tilio
 Lulados al dormad',
 La matenruĝo vekos⁴
 Denove al migrad'!

6. Migrado, migrado
 Libera ĝojo vi,
 En brust' freŝe blovas
 La spiro de Di',
 La koro ĝojegas
 Por la ĉirkaŭa rond',
 Ke vi do estas bela,
 Ho, vasta, vasta mond'!

*Traduko de la Germana poemo "Der Mai ist gekommen" de Emanuel Geibel en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-235-466 (2006-05-07 20:51:04)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.

³Rimarkigo de Manfred Retzlaff: En la "Esperantista Kantaro", el kiu mi la tekston detajpis, la linio tekstis: Sub ĉielo min kuŝos. Sed tio verŝajne estas pres-eraro.

⁴Ŝanĝpropono de Manfred Retzlaff: La matenruĝ' min vekos